

SUDFRANCIA STELO


N° 206 – 3an kvaronjaro 2013 - 3^{er} trimestre 2013



*Bulteno eldonita de la
Esperanto-Federacio
de Langvedoko-
Rusiljono*



Sudfrancia
stelo



La UK okazis en Rejkjaviko...

Enhavo:

P 2 : vortoj de la Prezidantino
P 3 : Vojaĝoj : UEA & SAT
Kongresoj,
P 7 : Line Usone
P 9 : Vivo de la grupoj
P 13 : Historio : UEA, 1923
P 16 : Interkant
P 20 : Courrier
P 21 : A propos de SFS...
P 22 : Recepto
P 23 : Tinĉjo

REABONNEMENT : Pour recevoir la **version papier**, pensez à vous (ré)abonner : tarif 10€ incluant la cotisation à la fédération à envoyer à Martine Ragonnet 2 rue Lepic, A62 34070 Montpellier. Pour recevoir dès parution la **version numérique** par internet : Cotisation à la fédération 2€ à envoyer à martine.ragonnet@orange.fr
Site de la fédération : <http://esperanto-languedoc-roussillon.fr>
Envoyer les contributions au site à : oli.manfredi@laposte.net
Et celle du SFS (idées, photos, articles, nouvelles,...) à Martine Ragonnet
2, rue Lepic A62 34070 MONTPELLIER, martine.ragonnet@orange.fr
Comité de relecture : Josée Boccadifuoco, Marie-Blanche Fondrillon, Arno Lagrange

VORTOJ DE LA PREZIDANTINO

Saluton al vi ĉiuj karaj geamikoj , legantoj de SFS, en ĉiuj partoj de nia Universo !!

Jen, la fino de la somero !

Jen la laborjaro jam komenciĝis per la kutima Foiro de Asocioj en Béziers, Nîmes, Montpellier,...

Tamen, ni devas atentigi ne tro rapide komenci la laboron, nur iom post iom ni al kutimiĝos.

Do, ni komencu aŭskultante aŭ legante la rakontojn de niaj geamikoj, kiuj vojaĝis tiun someron kaj bonvolas rakonti siajn periplojn.

Ni antaŭdankas ilin pri la belaj rakontoj, kiujn ni aŭdos aŭ legos.

Nur poste ni komencos la studadon de nia kara lingvo.

Kia lingvo ? ESPERANTO kompreneble !

Kia lingvo pli bela ol ĝi ni povus lerni ?

Karaj geamikoj belan novan lernej-jaron mi deziras al vi,

amike

via José B.



La Prochaine Réunion fédérale aura lieu à Nîmes :

Le Samedi 12 octobre 2013

Nous nous retrouverons au Centre Pierre Gamel, 5 av. des camarguais.

A 11h, un moment sera consacré à une Assemblée Générale exceptionnelle qui nous permettra de présenter le travail du bureau sur les statuts.

SOMERAJ VOJAĜOJ

En Rejkjaviko okasis la Universala Kongreso
La Stranga kaj Mirinda Insulo/ Arie Bouman (Bzrs)

Mi jam partoprenis en pluraj UFE-karavanoj kaj scias, ke ĉiam estas bone organizita ; nun ili organizis turisman viziton antaŭ la restado ĉe UK en Rejkjaviko, Islando.

Kiam oni parolas pri “Iceland”, mi kaj aliaj nederland-, angla-, germanalingvanoj tuj pensas pri glacio kaj glaĉeroj kaj vere mi konstatis meze de la somero, ke la nomo “Iceland” rilatas al tio.

Ni estis 24-ope (inkluzive ankaŭ 3 el Flandrio), kiuj kun bonaj islandaj ĉiĉeronoj vizitis pere de buso kaj diversaj hoteloj la

orientan kaj la sudan parton. Mi evitegas al vi aldoni la islandajn urbo-, vulkano-ktp - nomojn, ĉar vi ankaŭ verŝajne ne povus prononci ilin kaj la plej multaj el vi ne posedas mapon de tiu insulo. Oni avertis nin ke la vetero povus esti pluveta,... do komence nur iomete pluvis kaj la temperaturo estis 12°, post kelkaj tagoj pluvis preskaŭ nur kiam ni sidis en la buso. La postajn tagojn la temperaturo altiĝis ĝis 26° kun blua ĉielo sen pluvo! Mi ofte havas la impreson ke la nuboj similas al tro malalta plafono en salono.



Geografio



Islando situas tuj sub la polusa cirklo, ĝi ne estas parto de iu kontinento, do leviĝis antaŭ 20 milionoj da jaroj, sekve de



kuniĝo de tektonaj platoj de Ameriko kaj Eŭropo. Oni pensas ke la unua homa restado komencis nur en la 9a jarcento; la lando estis sendependa ek de 1944. Nun loĝas nur 330.000 en insulo kiu estas 3,5 x pli granda ol Belgio (11.000.000 enloĝ.). 2/3 loĝas en la ĉefurbo Rejkjaviko. La plej alta vulkano je 2.110m estas kovrita de glacio kaj estas la plej alta glaciejo en Eŭropo.



Miaj impresoj

Preskaŭ ne ekzistis dum mia restado la nokto; je la 22h30 (en Belgio/Francio jam estis meznokte - 00h30) okazis malrapide la sunsubiro, poste restis dum la tuta “nokto” sufiĉe da lumo por legi (laŭdire) la gazeton. Surstrate kaj en la naturo mi ne rimarkis malpuraĵojn, ĉar troviĝas multe da rubujoj eĉ kun cindrujoj!

Por kelkaj oni bezonas terenon aŭton aŭ pli altan aŭtobuson kiel nia, ĉar de tempo al tempo ni devis traveturi riveretojn eĉ sekvi parton laŭlonge kaj meze de ili. La ĉefvojoj estas bone asfaltitaj, nur la turismaj vojoj inter la vulkanoj aspektas aventurplenaj! Ĉiam oni vidas akvofluojn de fluidigitaj glaĉeroj.

Ankaŭ nun kaj en la pasinteco okazis ofte tertremoj kaj vulkanoj eruptis. Bone konata vulkano estas la Eĝjafjallajökull, kiu laste kulpis en 2010 pri eĉ internaciaj problemoj.

La panoramo estas kolorigita per diverskoloraj cindroj kaj bazaltaj restaĵoj kovritaj kun algoj. Fulmoj de gejseroj kaj varmaj fontoj estis de tempo al tempo vere impona, ili altiris la scivolemajn turistojn kaj prizorgas hejtadon de domoj, elektroproduktadon, termobanejojn kaj fabrikojn. Ekzemple la plej longa ekspluatado pere de pumpiloj de varmega fonto havas en la komenco 100° kaj fine, post transportado en 74 km da tuboj havas ankoraŭ 65 - 75°!!!

Kun amfibia veturilo ni boatveturis inter la partoj de fendaj glaĉeroj kaj gustumis pecojn de glaĉero, kiu jam havis ŝajne pli ol 100 jarojn laŭ la ĉiĉerono.



La 98a kongreso

Okazis en la tre moderna koncertejo por la 1030 partoprenantoj en Reykjavik. Ili venis el 55 diversaj landoj. Kiel kutime en la programo estis la malfermo, artaj vesperoj, prelegoj, eks- kaj -kursoj; libroservo, koncertoj, kantado de koruso. Bedaŭrinde por la ekskursanoj dum la kongreso estis kelkaj problemoj; manko de sufiĉaj sidlokoj en la buso, manko de islandaj Eo-helpantoj/tradukantoj, eĉ oni devis longe atendi je tradukisto: li venis el ekstere de Islando kaj ne sciis/forgesis, ke la horo diferencas 2 h. malplifruo kun la plej multo de aliaj eŭropaj landoj.

Dum la fermo oni prezentis la renovigitan UEA estraron kaj transdonis la flagon al la venonta UK-organizanto de Argentino. La 100a UK (2015) okazos en Lille (Francio).

KER ekzamenoj

Katalin Kovats transdonis al reprezentantoj de diversaj landoj la diplomojn de KER-ekzamenoj.

DANKON al UFE kaj miaj kunvojaĝantoj, estis jam delonge mia deziro viziti tiun insulon.

Arie Bouman, Portiragnes (34) F / Knokke-Heist (B)



SAT Kongreso en Madrido



Alice, Diane, Andreo el Montpeliero kaj Véronique el Beziero partoprenis.

por Andreo, kiu iom komentis, la etoso estis ege bona! Li eĉ substrekas, dum tiu semajno, lian senton senti sin hejme, ĉiujn koni kaj tuj amikiĝi. Partoprenis multaj junuloj el pluraj landoj.

Alia ĉefa afero estis la bona organizado: riĉa programo, ekskursoj (al Toledo, Sepulveda, en Madrido), prelegoj, loĝado..

Liaj plej bone ŝatitaj momentoj: la fervora prelego de Miguel Fernandez pri poezio, kaj ankaŭ, la renkontiĝo kun hispanaj sindikatistoj de Madrido, kiuj komprenas kaj subtenas la esperantan ideon. Por daŭrigi tiun interesan kongreson, Andreo decidis, por pli vigle helpi la vivon de la revuo *Sennaciulo*, alpreni novan taskon en skipo (redakto kaj enpaĝigo). La venonta kongreso okazos Francie, en Dinan !



Mirinda, rimarkinda vojaĝo en okcidenta Usono / Line Maŭrel (Bzrs)

En majo 2013, kia bela vojaĝo en *okcidenta Usono* mi efektigis !
Imagu, gelegantoj de SFS : 5900 kilometrojn en komforta buso tra Kalifornio, Arizono, Utaho, Nova Meksiko, ĉu mi primajstru vortojn por rakonti ĝin kaj mian miron !

Tamen, mi pravas, ĉar mi deziras dispartigi mian grandegan plezuron... se vi ankaŭ deziras.

La ĉefa parto de la periplo konsistis en la vizito de parkoj.

La *Granda Kanjono* lasis al mi eksterordinaran impreson, ĉefe kiam mi flugis super ĝi. La blua rivero Kolorado fluis fonde de interkrutejo de ruĝaj rokaj klifoj, profundaj je 1800 metroj.



La *Ŝtonita Arbaro* estas tre kurioza loko. Antaŭ 225 milionoj da jaroj arboj falis, kuŝiĝis, enteriĝis kaj koloriĝis el diversaj mineralaj koloroj, kaj iĝis kiel ŝtonoj !

Estis malpermesite preni eĉ unu branĉeton.

En *Monumenta Valo* mi iĝis la ĉefulino kun John Wayne en vakeraĵ filmoj de John Ford. Mi serĉis sur la roka, kolora ebenaĵo, indianojn, bovgardistojn, soldatojn, pionirojn, sed trovis nenion, ĉiuj vivis en mia kapo!

Indianoj, nur laboris per turismo, kaj bovgardistoj nomitaj « rangers » prigardis la regionon.

Mi cirkaŭiris la *Meteorŝtonan Krateron*, kreita per la falo de aerolito antaŭ 500.000 jaroj. La NASA ĉi tie preparis la vojaĝon de la raketo Apollo.

En la *Sekoja Arbaro* la arboj kreskis pli ol 100 metrojn kaj mi malfacile ekvidis la pintojn. Mi ankoraŭ flugis super la *Lago Poŭell*, brilante sub la suno, inter grizaj rokoj. Mi ŝatis la ruinaĵojn de tre malnovegaj domoj en klifoj kaj la riĉajn muzeojn.

Ĉu mi parolos pri la urboj ? Mi surteriĝis en *Los Angeles*, la urbo de kino. Emocie mi paŝis sur Sunset bulvarado kaj sur trotuaro, vidis stampojn de piedoj, kaj manoj de famaj artistoj. Eĉ se mi ludadus skeĉojn por Zamenhofa tago, mi ne aldonus la miajn, mi restas modesta !

Mi ne tro longe restis en *Las Vegas*, la enirejo de mia hotelo « Ekskalibur » estis vasta kiel sportejo kaj entenis multegajn aparatojn, tablojn, por ludi monon. Biero kaj hamburgero mane, viroj kaj virinoj senĉese ludis. La homamaso iris tien kaj reen, parolante, ridante... mia kapo iomete turniĝis. Mi ne ludis, do nek perdis nek gajnis ! En la hotelo, ĉie, ĉiam, funkciis aliaj kazinoj. Nokte ni promenadis de hotelo al hotelo por admiri la spektaklojn : Venecio kaj gondoloj sur kanalo, alta ĉokolada fontano en mirinda ĝardeno, piroteknikaĝoj, ktp, ktp.

Mi haltis en la *Mormona centro* en St Georges. Fratino Klara klarigis la religion, la historion de tiu eklezio. Ŝi estis juna franca fraŭlino, kiu volontule laboras dum 2 jaroj, ŝi diris, ke ŝia patro estis Atestanto de Jehovo kaj ŝiaj frato kaj fratino ateistoj... la familiaj kunvenoj estis tre viglaj. Estis malpermesite eniri la blankan oran templon.

En San Francisko, kaŭze de seismo (1906) restas nur 6 malnovaj dometoj ! ni veturis sur *Golden gate ponto*, kaj boatis tra la golfeto en kie staras la malliberejo Alkatraz. Sur trotuaro dormis kaj vivis mizeruloj, ĉefe nigruloj, sen hundoj, sen mendi monon !

En *Monterey* ni pripensis la verkiston Steinbeck, en *San Diego* rememoris la unuajn hispanajn loĝantojn.

Fine, kio estas *Okcidenta Usono* por mi ? Eksterordinaraj parkoj, kiuj tute ne similas unu la aliajn, belaj aŭ nekredeblaj urboj, larĝaj vojoj (ok ŝoseoj), koka kola kaj hamburgeroj, ne komprenebla lingvo (mi ne renkontis esperantulon), turistaj objektoj faritaj en Ĉinio, magazenoj kaj la deziro esplori la aliajn partojn de tiu lando, sed kiam ? *Line*



VIVO DE LA GRUPOJ ...

Asociaj forumoj

NIMES



Ni partoprenis la asocian forumon en *Nîmes* (7/09). Deĵoris Claudine Coulomb (foto), Emmanuel Peigné, Lucas Perrier, kaj Frédéric Bourquin (foto). Tiun jaron, la urbestro de Nîmes kaj eŭropa deputito salutis nin ! Ni ricevis 11 intencojn pri esperanta kurso. Fine, post la informa kunveno, la 13a de Septembro, 3 personoj partoprenos la kursojn.

Ni organizos :

- 2 komencantajn kursojn (marde kaj sabate); Emmanuel Peigné estas la nova instruisto pri la marde kurso.
- 1 duan nivelon kurson (merkrede) ;
- 1 trian nivelon (sabate).

Venontan kluban kunvenon : 14/12/2013, okaze Zamenhofa tago.

BEZIERS



Venontajn datojn en Béziers
Lundi 18 novembre : preparation de la Zamenhofa Tago.
Samedi 7 décembre : Zamenhofa tago.
Samedi 18 janvier : préparation de l'AG, partage de la galette.
Samedi 15 février : AG

Bona novaĵo :

Marie blanche el la klubo de Béziers skribis : « Mi sukcesis la Ker-ekzamenon kaj mi dankas ĉiuj, kiuj ofertis al mi la eblecon tion fari.

Parolo 70/90

Skribo 61/80

Tio estas 15/20 mezvalora sed tamen mi kontentas ! »

MONTPELLIER



La datoj de Montpellier el la ĉiesdomo Escoutaïre :

Sabatojn :

la 19an de oktobro 2013

la 16an de novembro 2013

La 7an de decembro 2013 ni estos en Béziers por festi la Zamenhofan Tagon kun niaj amikinoj el tiu urbo !

La kursoj :

Marde : 16h30- 18h Ciesdomo G. Brassens

Jaŭde : 10h-12h Ĉiesdomo Escoutaïre



Tiun someron, oni ne nur vojaĝis, sed ankaŭ laboris !

BIBLIOTEKO

Tiun jaron ni estas dorlotitaj! Niaj geamikoj Jean-Pierre Peray, Fernande Terral, Michel Lecouvreur kaj Line Maurel donis al la grupo de Beziers librojn kaj diversajn dokumentojn. Ni dankegas ilin, ĉar ili multe riĉigis nian bibliotekon.

Biblioteko

Ni tutkore dankas la donacemajn gedonintojn de libroj, kiuj motivigas nin pri la aranĝo de la kluba biblioteko.

Do, antaŭ la somera ferio, la grupo de Beziers ordigis la nombrajn donacajn verkojn kaj la aĉetitajn novaĵojn.

Kun la helpo de Martine (malnova bibliotekistino) ni okupiĝis la tutan tagon:

- . malkovri kaj ordigi la librojn
- . etiketi ilin en la internacia normo
- . meti ilin en la reta datumbazo (base de données)
- . forigi la duoblaĵojn por doni ilin al la malriĉaj eksterlandaj grupoj, aŭ al la brokantaĵo
- . kaj finfine bone aranĝi sur bretaretoj de la biblioteko.

Ni laboris en korega kaj agrabla etoso, kiu estis plibonigita per aperitiva paŭzo ĉe Dalia kaj Armand.

Ni proksimume posedas 650 librojn:

Prozo, Poezio, gramatiko,... ni havas nombrajn metodojn, vortarojn, kiuj helpas nin lerni la lingvon kaj ankaŭ sufiĉe da infanaj libroj.



Kiu precize loĝas en nia biblioteko ?

La vera venkinto de la klaso, kompreneble, estas Zamenhof egalece kun...
Claude Piron !

Tuj poste alvenas William Shakespeare.

Honoreble klasitaj estas Gaston Warenghein, André Cherpillod kaj Marie Boulton (nura virino !)

JohanValano kaj Jean Forge sekvas tiujn unuajn ĉefaj aŭtorojn.

Tiuj nuraj 8 aŭtoroj reprezentas pli ol 10^o/o de nia biblioteko !

Tiu laboro, ne nur celas intence de niaj grupoj, ni ŝatus, ke niaj listoj aperu, inter alie, sur la federacia retejo, eĉ sur landa komuna bazo.

Nia ideo, tion farante, estas faciligi la trovon la libroj, por legi, labori, ktp

Kaj ankaŭ, se kelkaj libroj aperas tro nombraj, donaci al aliaj bibliotekoj...

Ekzemple, en Burundo oni ĵus malfermis bibliotekon, sed vere mankas la libroj !

Ni multe dankas tiujn, kiuj laboris por la biblioteko. Precipe Martine, kiu venis intence el Montpellier, kaj kiu laboris tiom multe, ke ŝi fariĝis malsana pro iskiato (sciatique).

Laurence Esclapez



HISTORIO DE NIA MOVADO

« Esperanto Monata Gazeto » en 1923

ESPERANTO
MONATA GAZETO

TABELO DE ENHAVO

1923
19^a Jaro, N-roj 269-280

ESPERANTISMO		Page	Page	
CEFARTIKOLOJ				
de Edmund Privat				
Dokami membroj	1	Paroliloj	165	
Pri la 1 ^o jaro de Esperanto	21	Dufofistoj	165	
La Komercita Kongreso	41	Publikistoj	166	
Por nia dek-kvina kongreso	85	Vegetaranoj	166	
La naciistoj de la Venecia Kongreso	105	Prikongresaj artikoloj: Prezento de „La majstrantaroj de Nuremberg“	161	
De Venecio al Nuremberg	125	Natan la sapulo, W. Lippmann	162	
Nia Dek-kvina Universala Kongreso	149	Madrighkoncerto	163	
Nia dek-kvina Kongreso en Vieno	177	Kabaredo de la „Literatura Mondo“	163	
Esperanto de la Ligo de Nacioj	197	Ekzameno al Schenkenbach	163	
Pri niaj ludoj	217	Internacia Faka Kongreso / Katolika Kongreso, komunioj 1, 2, 3	114	
La Zamochda Tago 15 decembro	217	Antarkongreso kaj volapuko / Internakongreso en Paris	96, 99	
KONGRESOJ				
XV ^a Universala Kongreso de Esperanto en Nuremberg:				
Oficialaj komunioj: Ĉirkularo 1, 2, 3, 4, 5, 6	10, 74, 94, 112	Internacia Rajna Karavano	75	
Prezento pri la XV ^a kongreso: Malfermo	190	Novaj kongresoj: Belgio en Namur	78, 111	
Unua Labora Komitato	192	Brazila en Rio de Janeiro	112	
Dua Labora Komitato	193	Brita en Bournemouth	75, 111	
Tria Labora Komitato	195	Danujo	78	
Ferme Komitato	197	Franca en Limoges	113	
Konstanta Representantaro de la Naciaj Societoj	160	Iberia en Valencia	113	
Prikongresaj artikoloj: Liberaj vortoj, D-ro Orthal	11	TRA LA MONDO ESPERANTISTA		
La Bala Nuremberg: Hava Ping	90	(Diversaj artikoloj kaj regulaj informoj)		
Aktuala kongresdandadoj	95	OFICIALAJ KOMUNIOJ DE ESP. ORGANIZAJOJ		
Ĉu la XV ^a estas vere Internacia kongreso?	133	Akademio, Eklitoj		149
Faka komitato de la XV ^a kongreso: Bilingvuloj	190	Centra Komitato		186, 206
Fervojistoj	164	Oficialaj Institucioj de Esperanto		229
Imprimistoj	164	Brita Esperanto-Asocio		239
Ĵurnalistoj	164	Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio		115
Kristanoj	164	Centra Unua Esperanto-Ligo		91, 137, 229
Laborkomitatoj	164	Svisa Societo Esperanta		3, 30, 77, 98, 114, 139, 166, 206, 232
Liberpensuloj	164	Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko		231
Okultistoj	166	Esperantista Literatura Asocio		230
		Fervojistoj: Internacia Asocio de Esperantistaj Societoj		107, 308, 231
		Oficiala Informilo		107, 308, 231
		Memoranda (Komitato) de la Organiza Komitato		93, 134, 170, 232

Oni donacis al nia grupo C.B.E., la kolekton de tiu revuo de la jaro 1923. Oficiala organo de UEA (11 gazetoj, julio kaj aŭgusto kune), forte kartonbinda, ĝi tute ne similas al la nuna « Esperanto ».

En 1923 la gazeto pli granda (10 paĝoj) konsistas el etaj literoj sur maldika papero, nur kelkaj fotoj de viroj (ne virinoj). Ĝi estas malfacile legebla.

La enteno

En ĝi, densaj artikoloj pri diversaj temoj : scienco (senfadena telefono), societo (protektado de infaneco), biografioj (Blaise Pascal), literaturo (la genio de Galsworthy), rakontoj (la du somnambuloj el Usono),

muziko (IXa simfonio de Beethoven), botaniko (spicoj kun vortlisto), uzado de esperanto (sufiksoj kaj prefiksoj), rimarkinda homo (Mezzolani, kiu lernis 50 lingvojn kaj parolis 30 dialektojn).

Kongresoj

klarigoj pri « la Komerc-turisma Konferenco » en Venecio (2-4 aprilo 1923) : 209 korporaciistoj partoprenis (29 francoj el kiuj la komerca ĉambro el Nimes). En Nuremberg (2-8 aŭgusto 1923) aliĝis 3700 kongresanoj el 41 landoj (11 francoj).

Multaj informoj pri la naciaj eventoj, la aktivaĵoj en landoj.

La grupoj estas ege laborema, ĉefe la fervojistoj kaj la filatelistoj.

En nia regiono Sro Laurent Bergit (43, av. Saint-Saëns en Beziers) apartenas al la esperanta literatura asocio. Delegito de la Federacio Sro Llech renkontas en Narbonne Sroj Gouzy kaj Amourous kaj Sro Bourjade en Fleury d'Aude.

Sro Aphonse Carles el Beziers estis delegito de U.E.A.

Literatura kroniko

Tiu kroniko konsistas ĉefe en la prezentado pri novaj libroj kaj entenas multajn paĝojn. Ofte aperas malgajaj, romantikaj, aŭ friponaj poemoj.

Jen unu strofo de « Tropika Vespero » de Ruben Dario poste la verkaĵo de Carmen Sylva (st).

« De l'abismo rokas
plende
Maldoĉa voĉo sonora
Dum kantas la vent',

la maro Ploras.
Nur estas unu feliĉo,
La devo
Nur unu konsolo,

La laboro
Nur unu ĝuo,
La belo.

Sed en la esperanta kabaredo la « Verda Kato » en Parizo oni malĝojis pri la horora milito, kie mortis nombraj esperantistoj.

Ridu legante pecon de kanto...

La nova paro,
ĝojpetola
Tre deziris esti sola
Al ĉiuj do adiaŭdiris
Kaj diskrete ili iris
Gvidis ilin je la lito

la delegito De U.E.A.
Kaj tiam li pro bona
ordo
gardostaris ĉe la pordo
Rigardis li pro
malenuo

Iom tra l'serura truo
Kaj poste sendis li, laŭ
devo
La raporton al Ĝenevo.

Grava evento

La 1an de septembro 1923 terura katastrofo okazis en Japanujo : senantaŭekzemple fortaj skuoj de tertremo daŭris verŝajne pli ol 5 minutoj. Ĝi detruis la plej vastan parton de Tokio , Yokohamo kaj iliaj najbaraj urbetoj. La nombro de la mortintoj kaj de la vunditoj ŝajne atingis 1.356.468 kaj 316.087 konstruaĵoj estis ruinigitaj. La tuta monsumo pri materiala difekto kalkuliĝos 5 miliardoj.

Finfine en Japanio nia movado neeviteble malvigliĝis kaj malfortiĝis dum kelka tempo.



Esperanta vivo

Mortintoj, naskiĝoj, fianĉiĝoj kaj edziĝoj aperis en gazeto, ĉefe por la eksterlandanoj kaj ne multe por francoj. En Saint-Etienne ĉe la gesinjoroj Thevenin nakiĝis filo Jean. La delegito Sro Ferez anoncis la naskiĝon de sia filino Mirinda (la bela propra antaŭnomo). Oni ankaŭ gratulis ĉiujn, kiuj obtenis honorojn kaj ordonojn.

Diversaj kronikoj

- Korespondado : nombraj esperantistoj deziris korespondi kun aliaj samideanoj kaj indikas sian adreson.

- Interŝanĝo : aliaj deziras vendi, interŝanĝi poŝtmarkojn, librojn, monbiletojn, rimedojn, antikvaĵojn kaj informojn.

Ekzemploj : Iu serĉis la lernolibron en 20 lecionoj pri persa-esperanta lingvoj de Bahmen Shidani (Teheran). Iu vendis belajn svisajn brodaĵojn por 50 svisaj frankoj pokilogrammo.

- Ludoj : ŝakoj, enigmoj aŭ amuzaĵoj *Konkludo*

1923-2013, naŭdek jarojn poste ĉiam Esperanto ekzistas pli kaj pli agrabla kaj interesa.



ĉu vi rekonas niajn samideanojn Gilles & Myriam?

Ni deziras longan vivon al nia internacia esperanta gazeto ! *Line Maurel*



Interkant' - originala projekto



En februaro 1997, Manjo Clopeau kaj Franjo Lévêque vizitis la koruso-staĝon organizitan de Jorgos en Arjeĝo. Tio instigis Franjo-n, profesia ĥorestrino, gvidi esperantan koruson. Poste, la organizintoj de la SAT-Amikara kongreso kiu okazis en Quintin en 1998 proponis kiel antaŭ-kongreso korusstaĝon gviditan de Franjo kun kantistoj el diversaj partoj de Francio por kanti interalie bretonajn kantojn esperantigitajn de Manjo kaj Jacques Le Puil. Dum la kongreso, la staĝantoj koncertis, Flo (Martorell) registris kaj tiel aperis unua KD, ne publike vendita. Bretonaj kantistoj plezure daŭrigis la aventuron,

do helpe de Manjo kaj de la bretona federacio naskiĝis Meven. Tiukadre, aperis du kdj. Franjo parolis pri sia deziro esperantigi la *Ĝeneralan Kanton*. Dank'al Geoges Lagrange, pluraj poemoj estis tradukitaj... tamen la projekto ne tuj konkretiĝis.

Kiam Franjo emeritiĝis, ŝi eltirkestigis la poemojn kaj eklaboris al adapto de la projekto por amatora koruso, grandparte konstituita de Meven-korusanoj, sed ankaŭ de esperantistaj kantistoj el diversaj francaj regionoj.

La *Ĝenerala Kanto* estas adaptado esperantlingve de naŭ poemoj de la oratorio *Canto General* de Pablo Neruda

(tekstoj) kaj Mikis Theodorakis (muzikoj). La verka deveno estas aro de 250 poemoj publikigitaj en 1950 de la ĉilia poeto Pablo Neruda (1904-1973). Verkita grandparte kaŝece dum kiam la poeto forkuris de polico en sia lando, la *Ĝenerala Kanto* estas batalekrio kontraŭ ĉiuj premegaj formoj de la konkistadora ĝis la nuntempa diktatora epoko, estas ankaŭ solidareca kanto kun la subprematoj, la humiligitoj kaj la ekspluatantoj. Vivanta siavice ekzile post kontraŭstaro al diktatoro en sia lando, la greka komponisto Mikis Theodorakis (1925), komencis muzikigi parton de la *Ĝenerala Kanto* en 1973, li finis tiun laboron nur en 1981. Lia muziko – plena de forteco, violento, doloro kaj malgajeco – plifortigas la versan potencon de sia amiko Pablo Neruda.

La projekto kunigis solistajn partojn: tenoran (FaMo) kaj mezo-sopranan (Maja); korusajn kaj deklamantajn (Jacques Yvart). Por riĉigi la spektaklon, en ĉiu koncerto kelkaj muzikistoj akompanis nin, inter ili Lino Markov gitar-kaj pian-ludis, aliaj ne esperantistoj aldoniĝis.

La projekto konkretiĝis, estis tempo por krei oficialan

asocion: la 11a de majo 2009 Interkant' naskiĝis en Essonne.

La unua koncerto okazis en Bureso, memore al Georges Lagrange, la 12an de julio 2009. Samtempe, Franjo informis pri la projekto en diversaj poresperantistaj revuoj por alvoki al la koruso. Ŝi pretis viziti grupetojn, minimume dek homoj, por laborigi ilin, en diversaj francaj regionoj. Tiel ŝi promenis tra Francio dum du jaroj: en Strasburgo, Parizo, Tuluzo, Le Mans kaj Bretonio kompreneble.

Restis du poemoj ne tradukitaj de G. Lagrange; por plu kompleti la prezenton d'Interkant', Franjo petis Michel Duc Goninaz traduklabori *la Liberigantoj-n* kaj al Bernard Behra *Ja vivos mi -n*. Tiu lasta kanzono estis originale kvarvoĉe verkita kaj Franjo ĝin adaptis al solista kanto.

Zdravka eklaboris por anstataŭi Maja-n de tempo al tempo kiel solisto mezo-soprana kaj J-P. Ducloyer anstataŭis J. Yvart kiel deklamanto.

Post la unua koncerto en Bureso, okazis ses aliaj koncertoj:

Hillion dum SAT-Amikara kongreso la 4an de aprilo 2010; *Kaiserslautern* dum komuna kongreso de Esperanto France

kaj Germana Esperanto-asocio
la 23an de majo 2010.

Le Mans, la 13an de junio
2010 ;

Kubo, dum Universala
Kongreso en Havano, la 22an de

julio 2010 ;

Parizo, la 5an de novembro
2010 ;

Tuluzo, la 6an de marto 2011.



La lastaj koncertoj ankoraŭ ne okazis, kiam jam Franjo eklaboris pri nova projekto : *Ĉirkaŭ Karmen* '. *Karmen* estas tragedia opero de Georges Bizet, laŭ libreto de Henri Meilhac kaj Ludovic Halévi, laŭ la novelo *Carmen* de Prosper Mérimée. Estas unu el la operoj la plej luditaj en la mondo.

Ŝi unue pensis prezenti adaptiĝon de la opero, sed tio postulis grandegan muzikan investon, kiu ne kongruis kun la stato de la asocio tiuepoke. Pro tio kaj pro persona intereso al la verka historio de tiu opero, ŝi decidis proponi koncerto-konferencon, klarigante la diversajn etapojn dum la verko de *Karmen* '.

La spektaklo alternas koruspecojn (infanan, viran, virinan, ambaŭseksan), solistajn partojn, hispanajn dancojn kaj klarigojn teatrigitajn, ĉio enscenigita de Monique Lucas kaj muzikakompanata de Muriel Védrine, pianistino.

Franjo multege laboradis kaj daŭre laboras por konkretigi tiun novan projekton :

Ŝi gvidas la korusojn ;
Ŝi soliste kantas kun Maja, Zdravka kaj Laurent Peuch ;
Ŝi teatrumas kun Robin' Beto aŭ Sebastien Erhard ;
Ŝi interkonsentas kun asocio pri hispanaj dancoj por hispanigi kaj beligi la spektaklon.

La spektaklo okazis jam kvar foje sukcese, en diversaj kuntekstoj :

En *Metabief* dum SAT-Amikara kongreso, sur malgranda scenejo kun fosto meze, spektantoj duflanke ;

En *Artigues* dum kongreso de Esperanto France kaj Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, sur malgranda scenejo tre komforta (pro tapiŝo, kiu tre malhelpis la dancistinojn), spektantoj unuflanke ;

En *Bouresse*, scenejo sufiĉe granda, spektantoj duflanke kaj ampleksa infankoruso... la lernantoj en bazlernejo kontribuis kaj en la spektaklo kaj en la spektantaro konstituita grandparte de la infanaj familianoj ;

En *Plouezec*, dum la internacia semajno, la 18an de aŭgusto.

Restas du eblecoj spekti tiun vidindan koncerto-konferencon :

*En Lavelanet, loka koruso invitas nin ;
Jorgos trovis lokajn dancistinojn kaj infanojn por la infankoruso, la
31 an de oktobro ;*

En Le Mans, la 15an de decembro.

Véronique Bichon



Courrier d'un lecteur :

« Félicitations pour le dernier numéro de SFS qui nous apporte toutes sortes de nouvelles, petites et grandes, de la vie de l'espéranto dans notre région et au-delà. Bravo en particulier à Andreo, dont la démarche pour enseigner avec la méthode directe est à saluer. Il est remarquable qu'il se soit lancé sur les pas de son prédécesseur Andreo (!) Cseh, de plain-pied dans la pratique. Je ne doute pas que, de cette façon, (notre) Andreo affermissse sa maîtrise de la langue, que je trouve déjà irréprochable. Et je suis sûr, qu'ayant rencontré les limites de la méthode Cseh, il l'améliorera en s'appropriant & en développant une méthode personnelle.

Je suis aussi heureux d'apprendre que c'est le milieu libertaire qui accueille son nouveau cours. Il y a toujours eu, pour moi, un lien profond entre « l'idée interne » de la langue de Zamenhof et l'idéal libertaire. Un libertaire qui va jusqu'au bout de son idée ne peut qu'être favorable à l'espéranto, et un espérantiste qui cultive l'idée interne de la langue, ne peut que s'approcher du rêve d'un monde fraternel et libre, qui tient tant au cœur d'un libertaire. La méthode directe s'inscrit parfaitement dans cette vision car elle incite l'apprenant à s'autonomiser, à se prendre en main, ce qui est la base de la liberté.

Une autre nouvelle a retenu mon attention : celle de la pétition pour que l'espéranto soit langue officielle de l'UE. Véronique a certainement raison de soulever des objections, et elles sont tout à fait recevables. Cependant je pense qu'il faut être ouvert à des initiatives venues de n'importe où et qui débordent l'immobilisme affligeant des associations à toutes les échelles, qui ne se montrent pas capables de faire « bouger les lignes ». Certes l'UE ne semble pas prête à accueillir l'espéranto comme langue officielle pour toute une série de raisons y compris réglementaires (mais une règle peut changer).

Quoiqu'il en soit, cela me semble un objectif motivant à mettre en avant, une revendication mobilisatrice ! Toutes les utopies ont toujours parues délirantes, tant que le monde n'était pas prêt à les voir se concrétiser. Qui, en France croyait possible la République, même en 1791 ? Alors non je ne trouve pas stupide cette initiative et je pense qu'il faudrait plutôt lui faire bon accueil, l'encourager et lui permettre par tous les moyens d'aboutir.

Peut être qu'une énième pétition sur internet est dérisoire, par contre si cela aboutissait à une initiative citoyenne au niveau de l'UE, oui ça pourrait changer les choses » *Arno*

Vous aussi si vous le souhaitez, donnez faites nous partager votre opinion...



Question à propos du SFS...

Votre avis peut permettre de rendre plus intéressant ce magazine qui fait le lien entre tous nos groupes ! Si vous participez à la réunion du 12 octobre nous en parlerons...

Critères	Insatisfait	acceptable	Satisfait
Nb de pages			
Format A5			
Equilibre ling. Eo/ fr.			
Rubriques			
Sujets abordés			
Longueur des articles			
Opinion générale			

Ce qui vous intéresse

Le plus :

Le moins :

Points forts:

Points faibles:

Une rubrique à développer?

D'autres idées.....

*Josée sendis la **recepton** de*

BAKITA RIZO

Antaù ĉio, fritiĝi : pecojn da porkaĵo, kokinaĵo, ruĝan pipron, salikokojn, mitulojn, ajlon...

En plado taŭga por mikroondo, meti rizon (unu parton da rizo por tri partojn da varma akvo) supre, bele aranĝi la diversajn pecojn kaj aldoni salitan akvon kun safrano (aù kurkumo) jam varmigita kaj olivoleon .

Kovri per speciala papero (mikroondo).

Bone fermi ĉirkaù la plado kaj kuiri en mikroonda forno 10 minutojn.



Oni povas kuiri en normala forno !

Sur tiu foto ne estas rizo sed vermiĉeloj.

oni diras en Valencia lingvo : fideù.

Temas pri sama manĝaĵo sed kun vermiĉeloj anstataù rizo kaj iom malplilonga kuirado.



